


BULTENO DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA

n-ro 4

oktobro-decembro 1972



70 JAROJ DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

Kiel rememoras E. Kühnl, siatempe redaktoro de la gazeto "Časopis českých esperantistů", okaza vizito de la rusa esperantisto I. O. Seleznev en Praha, kiu serĉadis kelkajn samideanojn laŭ la Zamenhofa adresaro, kunvenigis la dissemiajn adeptojn de Esperanto en la bohemia ĉefurbo. La fandan kunvenon de EKP oni kunvokis la 9-an de decembro 1902 en la restoracio "U Štajgrů" (hodiaŭ "U Nováků", en la Vodičkova strato). Inter la partoprenintoj estis i.a. E. Weinfürter, la unua prezidanto de EKP, la fratoj E. kaj Fr. Kühnl, St. Kamarýt kaj la jam konata ĉeĥa poeto St. K. Neumann, poste - ano de la unua kluba komitato.

Dum kelkaj jaroj troviĝis la klubejo en la fama kafejo Union. La unua publika E-kurso en Praha malfermiĝis fine de 1902 en la urba lernejo de St. Triunuo. La gazeto "Časopis českých esperantistů" (fondita en 1906) servis ĝis la konstituiĝo de la Bohema Unio Esperantista (1908) kiel kluba organo.

La celo de EKP fiksita de la fondintoj estis; krom popularigo de Esperanto "vastigadi laŭjustan informadon pri la ĉeĥa nacio". (Per sia agado la klubo tuj ĉe la komenco fidele servis al tiu ĉi devizo. Ateston postlasas pri tio ekz. eldono de la "Gvidlibro tra Praha", propaganda laboro okaze de diversaj en- kaj eksterlandaj ekspozicioj, eldono de politika libreto "Slovakoj kaj Magiaroj" (1908). La klubo grave kontribuis al la okazigo de la I-a kongreso la ĉeĥaj esperantistoj en 1909.

Dume estiĝis en Praha kaj ĝia ĉirkaŭaĵo diversaj aliaj E-organizaĵoj kaj filioj de EKP kiel ekzemple Laborista Grupo Esperantista (1911), Studenta Rondeto Esperantista k. a. Antaŭ la unua mondmilito la EKP nombris jam ĉirkaŭ 250 pagantajn membrojn, posedante ankaŭ sian propran bibliotekon kun pli ol 600 volumoj.

EKP aparte meritiĝis en preparo de la XIII-a Universala Kongreso de Esperanto en Praha (1921), organizante tiam ankaŭ multajn E-kursojn. Okaze de sia 25a datreveno EKP aranĝis entute la plej ampleksan publikan ekspozicion priesperantan en Praha (1927). La klubaj programoj inter la du mondmilitoj alportadis precipe kulturajn valorojn. Ili estis vizitataj ankaŭ de diversaj publikaj reprezentantoj.

Aktivecon de la klubo paralizis la nazia okupado. La laboro temen daŭris plu, kvankam ne publike. EKP estis abolicita en 1944.

Post la liberiĝo de ĈSR, la klubo malfermis novajn E-kursojn kaj helpis rekomenci E-elsendadon en la Ĉs. radio. En 1949-50 ĝi havis pli ol 500 pagantajn membrojn. Kiam ĉesis ekzisti EAĈSR (1952), ĝi fariĝis fakrondo de Osvětová beseda kaj denove memstariĝis en 1968. Laŭ la nova statuto (1971) EKP estas loka grupo de ĈEA.

Resumante la 70-jaran historion de EKP ni kun respekto rememoras ties meritajn laborantojn kaj funkciulojn kiel R. Hromada, dron A. Pitlik, Koutek, J. Šustr kaj aliajn.

O. K.

Programo de la jubilea festo (24-26.11.72)

- | | |
|---------------|--|
| 24.11. | Amika kunestado (vespere) |
| 25.11. (9,00) | Kultura Domo "Gong" en Praha-Vysočany:
Festo de 70 jaroj de EKP" (parolos J. Vitek, prez. de ĈEA). Arta programo. |
| (16,00) | Teatra prezentado. |
| (20,00) | Societa vespero kun danco. |
| 26.11. | Ekskurso tra la vidindaĵoj de la ĉefurbo. |

DIAMANTA JUBILEO

En la tagĵurnalo trovis
komunikon la leganto:
ke estiĝis nova lingvo
de Doktoro Esperanto.
La studentoj scivolemaj
tiun lingvon tuj eklernis
kaj por nobla nova sento
siajn korojn ekmalfermis.

En la jar' mil naŭcent dua:
plia komuniko grava,
ke ĵus estis establita
Esperanto-klub' en Praha.
Oni verkis lernolibrojn,
eĉ gazetoj jam aperis
kaj insignon de l'espepo
oni portis kaj fieris.

La popol' de Praha tiam
indiferenta ne ŝajnis,
baldaŭ en la klubo vere
novaj membroj svarmis.
Kaj prosperis la movado,
ja estiĝis eĉ elito. . .
Sed haltigis la progreson
la unua mondmilito.

Tiuj tagoj malfeliĉaj
plian malĝojigon portis
por la anoj de la lingvo:
Zamenhof, la majstro, mortis.
Tamen lia verko restis,
na perfidis la anaro
kaj memoron lian festis
laŭ la dat' de l' kalendaro.

Fine ĉesis la milito.
Nia klub' denove vivis,
eĉ progresis per sukcesoj
kaj disfloris kaj aktivis.
Antaŭ Praga Mondkongreso
la preparlaboroj hastis
kaj en Praha ĉe klubanoj
miloj da amikoj gastis.

Dudek jarojn regis paco,
kiun la homar' deziris.
Ni en kluba atmosfero
ĝoje kaj libere spiris.
Ĉe dimanĉaj ekskursadoj
Esperanto ankaŭ sonis,
librojn, kursojn kaj amuzon
nia vigla klubo donis.

La kvardekon de la klubo
ĝoje festi ni ne povis. . .
Super ni jam staris nubo,
de Okcidento vento blovis.
La Gestapo malpermesis
al la klubo la agadon,
la bibliotekon donis
al detruo kaj rabado.

Sed eĉ tiu nubo pasis
kaj en foro malaperis.
Tiam ankaŭ nia klubo
releviĝis kaj ekspiris.
Kaj denove ĉe l'komenco
oni en malpleno staris:
perdojn, vundojn kaj viktimojn,
popt milito inventaris.

Post nelonga tempospaco
repleniĝis niaj vicoj
per adeptoj esperantaj,
veteranoj kaj novicoj.
La sesdeka jubileo
estis plena de sereno:
sonis muziko kaj kanto,
festparolo kaj poemo.

Kaj ĉijare nia klubo
jam sepdekon ĝoje festos.
Vi, fidelaj klubo-membroj
certe ĉe l'soleno estos.
Oni kantos la Esperon,
oni hisos verdan flagon.
Venu, venu en la klubon,
ĝi etendas siajn brakojn.

LA KLUBO TRA JARDEKOJ
mmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

En la postsignoj de S. K. Neumann

Morton de S. K. NEUMANN, eminenta ĉeĥa poeto (la 28-an de junio 1947), ni enskribas tie ĉi ne sole por rememorigi elstaran verkiston kaj batalinton por la socialisma idealo, sed ankaŭ por rememorigi iaman kunlaborinton. Kiam ni, junuloj dudek jaraj, fondis en decembro 1902 Esperantistan Klubon en Praha, estis inter ni ankaŭ li, tiam poeto jam renomita, travivinte sian periodon anarĥisman.

Li estis ano de la unua kluba komitato akceptinte funkcion de "dom-mastro" kaj dum jaro sufiĉe regule vizitadis la semajnajn kunvenojn en kafejo Union. Li sciis lingvon tiom, ke li povis dum polemiko kun verkisto K. Dostál Lutinov ataki lin per esperantlingvaj versoj.

Tiun ĉi rememoron pri la glora verkisto ni ne forgesos.

St. Kamarýt en ESPERANTISTA, n-ro 6, 1947

Kaj la jaroj pasas

Estis septembra, sed ankoraŭ varma vespero en 1929, kiam mi renkontis nekonatan esperantiston, kiu invitis min kaj akompanis en la Esperantistan Klubon, kiu tiam okazigadis siajn kunvenojn en Odborový dům (Sindikata Domo) en subtera, sed bela kaj konvena ejo.

Ĉar mi ĵus estis venanta el kamparaj urbetoj, Praha estis por mi ĉiel nova kaj dezirinda. La klubejo estis longa salono kun vicoj da tabloj. Ĉe unu el ili sidis kursanoj kaj la gvidanto, rekonante en mi komencanton, invitis min eksidi kaj partopreni la kurson. Li estis neniu alia ol nun al niaj esperantistoj konata Vuk Echtner.

De la tiama kluba vivo mi multon rememoras: jen okazis dimanĉaj ekskursoj en la naturon, jen mi aŭdis kanti nevidantajn esperantistojn de la Klárov-Instituto, jen mi povis aŭskulti akran polemikon de iu klubano kun d-ro Pitlik, jen venis ekster-landanoj. Dum Pentekosto mi jam vizitis Dresdenon, kie okazis kongreso de la germanaj esperantistoj.

Multajn nomojn mi memoras ĝis hodiaŭ el la tiama membraro, kelkaj jam perdis sian vivon en la germanaj malliberejoj dum la lasta milito. Sed el tiuj, kiuj vivas kaj restis aktivaj ĝis nun, mi memoras ĉefe s-inojn Šustrová, Bárochová, Echtnerová, Šumavanská kaj aliajn.

En Praha estis tiam pluraj kluboj, kiujn mi ankaŭ vizitis, sed la plej nombra estis la nia, kie povis praktiki la pacan lingvon ĉiu, ĉu juna aŭ maljuna, simpla homo aŭ scienculo. Ankaŭ kelkaj figuretoj venadis tien, inter ili maljuna pentristo Bohutínský, kiu tuj proponis al vi siajn bildetojn por gajni kelkajn kronojn por vivteno.

Mi kun plezuro rememoras tiun lokon, kie mi inter bonaj homaj animoj travivis agrable kaj utile horojn, fariĝis adepto de Esperanto, kies ideon mi ĝis nun konsideras la plej praktika kaj efika rimedo por la interhoma kompreniĝo.

L. Kynčl

El obskura tempo

Dum la nazia okupacio ni estis kelkaj,, kiuj kunvenadis preskaŭ sekrete en la sama kafejo, kie antaŭe estis nia klubejo, sed en la apuda ĉambro nomata "Blua saloneto". Inter ni estis s-roj Šustr, Slanina, Bároch kaj kelkaj aliaj. Du- aŭ trifoje vizitis nian kunvenon iu "samideano", kiu subite sin montris tute malamike kontraŭ la ĉeĥa nacio per ege malkonvenaj rimarkoj. Ni komencis esti atentemaj. Ĉe la sekvanta rendezuo venis al s-ro Šustr kelnero kaj petis lin, ke ni tuj foriru, ĉar la antaŭan tagon venis tien gestapo kaj demandis lin pri nia societo. Tiu bona homo respondis nee pri la afero, dirante, ke neniu vizitadas la klubejon.

Okaze, kiam ni post nelonge vizitis ree la kafejon, la kelnero anoncis al ni, ke tiam eble duonhoron post nia foriro venis du gestapanoj. Evidente estis tiu perfida klubano, kiu prizorgis la inspekton, servante al nazioj por kelkaj mizeraj moneroj.

V. Lorenz

Vortoj de la eksprezidanto de EKP (kompreneble jubileaj):

Mi esperas, ke la renkontiĝo okaze de la Kluba jubileo donos al nia agado la novan injekton. Ŝajnas al mi, ke nia laboro iomete stagnis la lastan jaron.

/d-ro R. Horský/

... kaj de la prezidanto:

Praha povas fieri pri tio, ke inter la fondintoj de la unua E-klubo en Bohemio (la dua en la tuta aŭstra monarkio) troviĝis ankaŭ S. K. Neumann. En liaj spuroj ni volas daŭrigi nian agadon por la internacia lingvo.

/ark. J. Drlík/ .

DIVADLO, KTERÉ OBDIVOVAL NAZIM HIKMET

Eva Suchardová-Seemannová, absolventka pražské konservatoře, často přispívala do kulturních programů Klubu esperantistů v Praze. V roce 1954 se jí podařilo společně se svým manželem Antoni Seemannem uskutečnit dávné přání svého přítele J. Baghyho, založit při Klubu divadelní kolektiv, jemuž dala jméno "Verda ĉaro de Julio Baghy". Pod tímto jménem se skupina stala známou i ve světě. Baghy, světoznámý esperantista a spoluzakladatel tzv. budapešťské školy esperantské poezie ve dvacátých letech, jenž sám hrál divadlo jako válečný zajatec na Sibiři ještě za první světové války, dal pražskému souboru své "otcovské požehnání" a napsal pro něj i dvě jednoaktovky ("Granda ludo" a "Dum tondras kanonoj").

Soubor začínal krátkými divadelními a recitačními vystoupeními, až přešel na celovečerní hry. Tak uvedl – postupně a větší a větší jazykovou i divadelní kulturou – "Maryšu" bratří Mrštíků, "Pygmaliona" G. B. Shawa (celkem třikrát), "Noru" H. Ibsena, "Legendu o lásce" N. Hikmeta. Protiválečné drama "Matka" od K. Čapka předvedl kolektiv nejen v esperantu, ale i v češtině v rámci soutěže lidové umělecké tvořivosti.

Představení "Legendy" v roce 1958 byl přítomen sám autor, turecký básník Nazim Hikmet, který pozdravil publikum a prohlásil, m. j. že slyšel svou hru již v mnoha zemích a ve velkých divadlech, ale že ji poprvé slyší v esperantu, které ostatně, shledává velmi muzikálním. A dodal: "Nikde jsem však nebyl tak dojat jako dnes mezi vámi... ochotníky. Kdybych měl děti, doporučil bych jim, aby se učily esperantu".

O představení "Legendy" psal mezinárodní esperantský tisk, který navrhl pozvat soubor na světový kongres esperantistů do Varšavy /1959/. Inscenaci hry "Pygmalion" ve varšavském Paláci Kultury zhlédlo na tři tisíce diváků ze 45 zemí. (Hlavní účinkující: Eva a Antoni Seemannovi, P. Sádlo, J. Ondráček, P. Tichý). Následovalo pozvání na 45. světový kongres do Bruselu, které se již nerealizovalo.

Původní divadelní kusy A. Seemanna – "Korespondu", "La spirito venkas" a "Mi esperas" – získaly první, druhou a třetí cenu v dramatickém oboru Mezinárodní slovesné soutěže na 39. světovém kongresu v Haarlemu /1954/. Je pozoruhodné, že v posledním z nich byla – poprvé vůbec – uvedena na scénu postava L. L. Zamenhova v citlivé interpretaci J. Suchardy.

Nikdo netušil, že reprízou Pygmaliona 10. října 1959 v Praze se kolektiv "Verda Ĉaro" s publikem navždy loučí. Eva Seemannová, duše celého souboru, náhle zanechala práci na esperantském poli, a tak zanikl i soubor, jenž představoval v té době vrchol divadelního umění v esperantu.

Jako jedno ze svědectví budiž zmíněn článek v časopise Svazu vietnamských spisovatelů, který ještě v roce 1961 podával bilanci a ocenění činnosti "Verda Ĉaro". Podobnou pozornost známému esperantskému divadlu Český tisk dosud dluží. J. Mařík

/z esp. přel. O. K. /

Mia "veturo" kun Verda Ĉaro

Nur mallonge ĝi daŭris. Aŭtune 1956 mi kontaktis la pragan junularon kaj tiam konatiĝis ankaŭ kun la geedzoj Seemann. Iam en novembro ni kunsidis (ĉu kvinope?) por provadi unuaktajn de J. Baghy "Dum tondras kanonoj" kaj tiun de M. Boulton "Ĉe l' akvo de forgeso"- Eva kaj Antonio unue en sia loĝejo kaj poste sur la teatra podio dum kelkaj semajnoj pacience lekciis al ni aktoran dekalogon, kiun ni baldaŭ praktikis antaŭ la publiko en "Malá scéna". Mi ankoraŭ aŭdas la konfeson de palvizaĝa Eŭridiko:

"Subite mi vertiĝis en la spaco.... "

kaj ŝi trinkas pokalon da mistera akvo, kiu komplete forgesigas ŝin pri la mondo surtera.

Kurteno jam delonge falis post tiu prezentado, sed certe neniam estos forgesita inter la esperantistoj la aktívado tiu ĉi amatora aro, kiu antaŭ dekok jaroj ekiris por plentuni la revon de sia spirita patro kaj kiu plenumis ĝin dum sia kvinjara ekzistado kun rezulto eminenta.

O. Kníchal

TOMÁŠ PUMPR NE PLU INTER NI . . .

Kun profunda bedaŭro ni sciigas, ke la 10an de septembro en la aĝo de 66 jaroj forlasis nin membro de nia klubo, honora membro de ĈEA, kaj membro de Akademio de Esperanto, d-ro Tomáš P u m p r, tutmonde rekonata esperantologo, modesta homo kaj helpema amiko. La forpasisintan adiaŭis la 14.9. multaj anoj de EKP.

En d-ro Pumpr perdas la ĉeĥa Esperanto-novado personon, kiu restos daŭre rememorata en la historio de la Intemacia Lingvo kiel elstara fakulo, aŭtoro de prilingvaj studoj, sed precipe kiel majstro de la Esperanta vorto, tradukanto de ĉeĥaj literaturaj juveloj en Esperanton. Ni rememoru nur la verkojn "La Bapto de Caro Vladimir" de K. H. Borovský, "Bukedo el ĉeĥaj naciaj mitoj" de K. J. Erben kaj "Sileziaj kantoj" de P. Bezruč (kunlabore kun R. Hromada kaj J. Kořínek). Esperanton uzis d-ro Pumpr ankaŭ ĉe la tradukado de alilingvaj literaturaĵoj en la lingvon ĉeĥan.

Neforgesebla estos lia efika helpo prilingva ĉe la eldonado de la ĉs. numeroj de PACO kaj aliaj publikaĵoj pri Ĉeĥoslovakio.

D-ro Pumpr restos en nia memoro kiel klera kaj modesta samide-ano.

/kn/

Forpasis vi, amiko kora

/rememore al Tomáš P u m p r /

Tro fulme trafis granda plago,
Apenaŭ kredas mi ĝis nun,
Ke al Grandul' el ĉeĥa Prago
Ne plu radias monda sun'. . .

Ĉe la surtomba monumento
Amikoj semu da rutflor':
Atestu ĝi pri kora sento
De la estimo kaj dolor'. . .

Kl. Naudzius, Kaunas, Litovio
30. 9.1972

/El la poemo sendita al Anna Bárochová/

Li vivu en sia verko

Rememor-vesperon pri d-ro Pumpr okaze de lia neĝisvivita 66-a naskiĝtago aranĝis la klubo la 3an de oktobro. Sian poemon pri li deklamis J. Kořínek, kantis M. Smyčka kun akompano de V. Novobilský, kiu poste parolligos la unuopajn kontribuaĵojn. Sijajn personajn rememorojn pri la karmemora homo eldiris A. Bartošík, E. Felix, R. Horský, J. Kavka, J. Mařík, V. Novobilský kaj E. Urbanová. Ĉeestis s-ino Pumprová, la vidvino.

Tiuj geklubanoj, kiuj partoprenis la lastan viziton de T. Pumpr en la klubo antaŭ kelke da monatoj repensis pri lia tipa spiritpreteco: Tiam hazarde ĉeestis iu soveta esperantistino el Kievo. Kiel surprizita ŝi estis, kiam d-ro Pumpr flue rakontis al ŝi pri la miljara historio de ŝi a urbo, kiel tiel oni antaŭ mil jaroj faligis la statuon de Perun kaj poste ĵetis ĝin en la riveron Dnepro, kiel la antikva historiisto Nestor tiun ĉi okazintaĵon priskribis kaj post mil jaroj nia satiristo K. H. Borovský eluzis ĝin por sprite kaŝita kritiko de absolutismo en la aŭstra-hungara monarkio.

El ĉiuj tiuj rememoroj kiel el diverskoloraj ŝtonetoj iom post iom ekestis plastika mozaika portreto de la granda homo avide sekvanta ĉiujn plej novajn akiraĵojn de la scienco, sed samtempe entuziasmigita pro la ĉiutage ripetiĝantaj mirakloj de la naturo. Li tiom adoris Homeron, ke li kapablis kiam ajn duonhoron aŭ tri horojn parkere citi la Iliadon, greke aŭ ĉeĥe. Por li la lingvo estis ne nur interkomprenilo, sed ankaŭ pensilo kaj li ŝatis esprimi siajn en spritaj vortludoj, kiujn li malŝpare sendadis al siaj amikoj sur bildkartoj aŭ en leteroj.

Li vivu en sia verko, kies valoro ne estas ankoraŭ plene apreziata, sed kiu certe, transvivos ĉiujn, kiuj ĝin povas hodiaŭ pritaksi.

/Fx/

-----0000-----

P o k l á d n í z p r á v a

Do posledního letošního čísla opět přikládáme složenky na zaplacení členského příspěvku, žádali jsme ty, kteří už nemají o další členství zájem, aby nám alespoň vrátili Bulteno s poznámkou "Nepřijímám". Nestalo se tak, a protože bychom měli rádi pořádek v Členské kartotéce i přehled o našich věrných členech a příznivcích, opět důrazně žádáme dotyčné, aby tak učinili nejdéle do konce tohoto roku a tím nám ušetřili práci.

Příspěvek za rok činí:	výdělečně činní	Kčs 68
	důchodci	Kčs 44
	studující	Kčs 34

Členové, kteří si nepřejí dostávat svazový časopis Starto, zaplatí jen 30 Kčs, nově přihlášení do svazu o 10 Kčs více.

Anna Bárochová, pokladní

PROGRAMOJ DE EKP POR OKTOBRO—DECEMBRO 1972

=====

dato	preleganto	temo
3.10.	kolektivo	Tomáš Pumpr-postmorta rememoro
10.10.	doc. C. Votrubec	Gano, Togo, Dahomeo per la bildoj
17.10.	ark. J.Drlík	La 28-a de okt. kaj 50 jaroj de USSR
24.10.	J. Petrlík	Rakontoj el mia poŝo, (II)
31.10.	doc. C. Votrubec	Orienta Afriko 1972 (lumbildoj)
7.11.	B. Dryák	Kultura vespero
14.11.	A. Šustrová	"Alaska Stafeto" de F. Omelka
21.11.	A. Juřenová	Omaĝe al la 70a datreveno de EKP
28.11.	V. Echnér	Blindul-sekcio de ĈEA
5.12.	junularo	Nikolaa vespero
12.12.	d-ro R. Horský	Somero en Leningrado
19.12.	A. Hejnová	E n i g m o j
26.12.	kolektivo	Kristnaska vespero

MĚLNÍK SESFOJE

Je la 6-a fojo okazis en Mělník, 21-22.10. la ŝatata internacia renkontiĝo. Ĉeestis ĉ. 250 esperantistoj, inter ili nunjare eĉ sesdeko da eksterlandaj (GDR, Pollando, Aŭstrio, Hungario, Jugoslavio kaj Japanio).

Du specialaj aranĝoj kun ĉeesto de oficialuloj estas menciendaj. Unue: oficiala transdono, fare de Distrikta Packonsilantaro, de honora titolo "Pacdefenda Esperantista Rondo", unua tiaspeca en la lando - al la loka lerneja grupo esperantista (gvidata de J. Vítek), due: unuafoje surscenigo en Esperanto de "Aventuroj de Guignol" (de polaj aŭtoroj Moszczyński kaj Wilkowski) fare de la Ŝtata Pupteatro en Košice. La prezentado estis donaco de la slovaka ministerio de kulturo al la Renkontiĝo.

Substrekinda estas la relative multnombra ĉeesto de junularo. Krom ĵurnaloj la aranĝon menciis la radio kaj televido. Delegacio de (neesperarartisto) karavano luzaci-serba, restanta en la urbo, venis por amike saluti la esperantistaron. /J.M./

Ankoraŭ unufoje SET

En Starto kaj Bulteno aperis artikolo pri la jubilea 20-a SET en Lančov, en kiun enŝteliĝis neĝusta informo, kiu mirigis precipe la organizantojn de la 1-a SET okazinta apud Chvalatice ĉe la vglbaraĵo de Vranov. Tie ni legis: "... ĝian originon metis antaŭ 20 jaroj la organizantoj de la 1-a SET en Žimrovice (Silezio) ...

Probable temas pri miskompreno, ĉar la 1-a SET Chvalatice okazis en julio 1952, la SET Žimrovice okazis unu monaton pli poste, do en aŭgusto 1952. La organizantoj de la 1-a SET Chvalatice estis s-anoj P. Sittauer kaj J. Habeš, kiuj ĝin planis, kaj organizis. Tie en Chvalatice ili metis li semon en fekundan grundon; tie do estas la origino de la impona vico de dudek SET-oj. Kiel ĉio samn kaj vivikapbla ankaŭ la SEToj organizitaj de la E.K. Třebíč evoluis laŭ natura maniero kaj sen ekstera influo: la unuan modestan SET Chvalatice partoprenis geknaboj el Třebíč, la sekvantaj allogis iom post iom ankaŭ gejunulojn kaj fine ankaŭ maturulojn el ĉiuj anguloj de nia patrujo, ja eĉ de Eŭropo.

En la jubilea SETano n-ro 1/6 aperis artikolo Iom da Historio, en kiu ni legis: "En du kluboj samtempe naskiĝis ideo organizi someran tendaron." Tio estas ĝusta kaj justa konstato. Ambaŭ tendaroj, en Chvalatice, kiun partoprenis 16 gejunuloj el Třebíč, kaj Žimrovice, kun 27 gejunuloj el Opava kaj kelkaj aliaj lokoj, estis memstaraj kaj sendependaj. SET Chvalatice estis do origina, ĉar kopiaĵo ne antaŭiras la originalon. Estas domaĝe, ke la Opavanoj ĉesis post la 5-a tendaro sian aktivecon. Ĉar dividita laboro - duona laboro. Th. Kilian

Konsiloj por "eternaj" komencantoj

La plej granda obstaklo en la lernado estas timo kaj malfido al si mem. Ofte mi aŭdas: "Mi ja ne memoras la vortojn kaj regulojn, mi ne ellernos ĝin".

La ĉefa, afero estas komenci unu amo, ĝoje kaj plenfide al si, konvinkite, ke oni parolos bone esperante. Memkompreneble, se oni volas baldaŭ regi la lingvon, oni plenatente sekvu la klarigojn de la kursestro kaj penu regule vizitadi la lecionojn. Kaj hejme oni devus lerni la vortojn kaj regulojn. Kaj ĉefe konsciencie fari la traduktaskojn ĉe ĉiu leciono.

Post fino de la kurso, kiam oni scias la gramatikon, nepre necesas eklegi bonan esperantan literaturon. Komence oni povas legi nur malmulte, sed se oni pacience eltenos, oni baldaŭ rimarkos faciligon – kaj kia ĝojo, kiam oni kapablas legi eĉ tutan paĝon sen uzi la vortaron!

Vi verŝajne jam finis la kurson kaj ne bezonas ripeti ĝin, tamen mi pensas, ke ne estus vane, se vi refoje farus ĉiujn traduk-taskojn ĉe ĉiu leciono. Kaj legi, multe legi bonajn esperantajn tekstojn. Per tio vi lernos ankaŭ bonan internacian stilon kaj atingos fluan parolon, kion mi elkore deziras al vi.

B. Metznerová

UPOZORNĚNÍ ČLENŮM KLUBU! Klub esperantistů v Praze, místní skupina ČES, obdržel samostatné směnové pošt. číslo: 111 21. Ve své korespondenci proto používejte adresy: Klub esperantistů v Praze, Místní skupina ČES, pošt. schránka 1069, 111 21 Praha 1.

BULTENO DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA. Aperas kvaronjare.
Redaktis Oldřich Kníchal (resp. redaktoro) kun ing. Eduard Felix kaj Jaroslav Mařík.
Tiu ĉi numero aperis 15.11. 1972.